

# LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE



## Kelkaj vortoj

Vi trovas en tiu ĉi bulteno koncizan protokolon pri nia Ĝenerala Kunveno. Dankon al ĉiuj, kiuj subtenis nin per sia ĉeesto aŭ sia rajtigilo. La jaro 2013, jaro de justa komunikado, abundas je projektoj. Ni kalkulas pri vi por helpi nin realigi ilin. Antaŭdankon. Ĝis baldaŭ!

Pierre Jagueneau, Prezidanto

## Quelques mots

Vous trouverez dans ce bulletin un bref compte-rendu de notre Assemblée Générale. Merci à tous ceux qui nous ont soutenus par leur présence ou par leur procuration. L'année 2013, année de la communication équitable, est pleine de projets. Nous comptons sur vous pour nous aider à les faire aboutir, merci d'avance. A bientôt!

Pierre Jagueneau, Président

## Mallonga filmo el Ukrainio gajnas konkurson en Berlino

La Germana Esperanto-Asocio organizis mallong-film-konkurson por celebri la 125-an datrevenon de Esperanto. La premio-ceremonio okazis la 9-an de februaro 2013 en Berlino. La plej bonaj filmoj estas nun videbla ĉe YouTube.

La Ukraina kontribuo konvinkis la ĵurion pere de humuro kaj persona referenco. Oleg Zabolotnyi tie rakontas kiel lia patro dum longega tutmonda vojaĝo renkontis belegan Ukraininon, kiu baldaŭ poste donis al li filon. Ĉar la sola komuna lingvo de la paro estas Esperanto, la infano iĝas denaska Esperanto-parolanto. Unu generacion poste, la filo (la aŭtoro) ankaŭ mondvojaĝas kaj renkontas belegan Esperantistinon.

D-ro Rainer Kurz, kiu ĉef-organizas la mallongfilm-konkurson kadre de la Germana Esperanto-Asocio, estas tre fiera pri la diverseco de la 56 kontribuoj. "Mi neniam atendus tian vastan tutmondan resonon. La 17 partoprenlandoj el kvar kontinentoj montras la multecon de Esperantujo".

**Premioj** : 1000€ por la plej bona filmo en Esperanto: "Pasporta Servo!" de Oleg Zabolotnyi, Ukrainio. 500€ por la plej bona ideo (dividita premio): "Ideevolution" de Daniel Voss, Germanio. 500€ por la plej bona ideo (dividita premio): "Ĉu vi imagas?" de Eva Fitzelová, Slovakio.

**Landoj de la partoprenantoj** : Benino, Brazilo, Bulgario, Ĉinio, Finlando, Germanio, Hispanio, Italio, Kanado, Kongo, Pollando, Rusio, Slovakio, Sud-Afriko, Svislando, Ukrainio.


### Mallongaj informoj pri Esperanto :

Esperanto estis prezentata antaŭ 125 jaroj. Ek de tiam tiom multaj homoj lernis ĝin kaj per la uzo pli evoluigis ĝin, ke Esperanto hodiaŭ estas aŭtenta lingvo. Jen la historie unua pruvo, ke lingvoj povas esti kreataj.

La uzeblo de Esperanto estas elprovita en ĉiuj komunikaj situacioj, inkluzive la dulingvan



Pasporta Servo! - Oleg Zabolotnyi (UA) ★★★



La lingvo, kiu ligas - Christian Mono (DE) ★★

edukon kaj skribe en sciencaj kaj literaturaj verkoj. La Esperanto-aŭtoroj formas propran grupon en la mond vasta unuiĝo de verkistoj de la PEN-kluboj.

La fascinan de Esperanto kaŭzas ĉefe ĝia facila lerneblo, kiu helpas ankaŭ al ne-Eŭropanoj. Aparte de naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj renkontiĝoj la plej multa komunikado okazas en la Interreto. Google kaj Facebook havas Esperanto-versiojn, Esperanto-Wikipedia ampleksas nun proksimume 165 000 artikolojn. Pli ol 100 000 homoj registris sin en la Esperanto-instruejo lernu.net.

Fonto : Rainer Kurz

## Un court-métrage d'Ukraine gagne un concours à Berlin

L'association allemande d'espéranto a organisé un concours de courts-métrages pour célébrer le 125e anniversaire de l'espéranto. La remise des prix s'est déroulée le 9 janvier 2013 à Berlin. Les meilleurs films sont maintenant visibles sur Youtube.

Le concurrent ukrainien a convaincu le jury par son humour et sa référence personnelle. Oleg Zabolotnyi y raconte comment son père, pendant un très long voyage autour du monde, a rencontré une belle ukrainienne, qui plus tard lui a donné un fils. La seule langue commune du couple étant l'espéranto, l'enfant est devenu locuteur espérantiste de naissance. Une génération plus tard, le fils (l'auteur) voyage également dans le monde et y rencontre une belle espérantiste.

Le docteur Rainer Kurz, qui a organisé ce concours, est très fier de la diversité des 56 concurrents. "Je ne m'attendais pas à un écho mondial d'une telle ampleur. Les 17 pays participants de 4 continents démontrent la multiplicité des régions espérantistes".

**Les prix** : 1000€ pour le meilleur film en espéranto : "Pasporta Servo !" de Oleg Zabolotnyi, Ukraine. 500€ pour la meilleure idée (prix partagé) : "Ideevolution" de Daniel Voss, Allemagne. 500€ pour la meilleure idée (prix partagé) : "Ĉu vi imagas?" de Eva Fitzelová, Slovaquie.

**Les pays participants** : Bénin, Brésil, Bulgarie, Chine, Finlande, Allemagne, Espagne, Italie, Canada, Congo, Pologne, Russie, Slovaquie, Afrique du Sud, Suisse, Ukraine.

### Petites informations au sujet de l'Espéranto :

L'espéranto fut présenté au public il y a 125 ans. Depuis, beaucoup l'ont appris, et par l'usage l'ont fait évoluer de telle sorte que l'espéranto est aujourd'hui une langue authentique. L'utilisation de l'espéranto est éprouvée dans toutes les situations de communication, éducation bilingue comprise, et par écrit dans des oeuvres scientifiques et littéraires. La fascination de l'espéranto est due principalement à sa facilité d'apprentissage, qui aide aussi les non-Européens.

En dehors des rencontres et congrès nationaux et internationaux, la plus grande communication se passe sur internet. Google et Facebook ont leurs versions espérantophones, Wikipedia-espéranto comprend maintenant 165 000 articles. Plus de 100 000 personnes se sont inscrites sur le site d'apprentissage de l'espéranto lernu.net.

## Nia Ĝenerala Jarkunveno

La Ĝenerala Jarkunveno okazis la 16-an de februaro 2013 en la Centro Jean Vilar, en Angers, kun trideko da partoprenantoj.

Post bonvenigaj vortoj, la prezidanto legas la agad-raporton 2012. Jen ĝiaj ĉefaj punktoj.

- La kursoj : 2-a nivelo (merkredo) kun 3 lernantoj, kaj konversacia nivelo (ĵaŭde) kun ĝis 9 partoprenantoj.

- La nacia kongreso de la Esperantistoj Fervojistoj (FFEA) okazis en Angers de la 30-a de marto ĝis la 3-a de aprilo. La Esperanto-grupo de Angers kontribuis al la organizado kaj plivigado.

- Kadre de la Paco-Tago, nia grupo, kiu membras en la asociaro prizorganta la organizadon de la manifestacioj, forte partoprenis. La 19-an de septembro, en Angers, la japanaj Esperantistoj Hori Jasuo kaj Arai Toshinobu prezentis publikan prelegon pri la temo «Fukuŝima kaj nun ?», (kunorganizitan kun asocio "Sortir du Nucléaire-49"). La 21-an de septembro, Internacia Paco-Tago, la bonvenigan paroladon oni legis kaj en Esperanto kaj en la franca (ĉeestis pluraj lokaj oficialuloj).

La kasistino legas la finanĉan raporton, tiun de la Libroservo kaj proponas buĝeton por 2013.

Poste, la prezidanto prezentas la projektojn por 2013 :

► La gastoj : la grupo akceptos Andrej Grigoriev, rusa ĵurnalisto, de la 21-a ĝis la 23-a de majo.

► Internacia Paco-Tago, sabaton la 21-an de septembro, en Angers. Ni nun laboras por organizi spektaklon per Esperanto-parolantaj manpupoj.

► Esperanto ĉeestos ĉe kelkaj budoj en diversaj eventoj : ekzemple dum la malkovro-tago de asocioj en kvartalo La Roseraie.

► La kursoj plu okazas merkredo kaj ĵaŭde, kaj interesiĝantoj povas ekpartopreni iam ajn en la jaro.

► Nia gazeto Anĝeva Folio plu aperas proksimume 4 fojojn jare (disponebla ĉefe pere de nia retejo). Refoje, ni vokas ĉiun por en ĝi esprimiĝi, proponi temojn, artikolojn...

► Vikipedio : la projekto bezonas estis re-prizorgata, por ke nia grupo pli konatigu sin. Volontulojn oni atendas...

► Rilatoj kun aliaj asocioj de Angers :



La asembleo dum la prezentado de la jara raporto



Humura historieto de Geneviève, Lucien kaj Frédéric



Danĝera situacio en la aviadilo pilotita de Jeanik



Agrablaj interŝanĝoj post la kunveno kun la tradicia kuko

la bilanco de la pasintaj jaroj estas tre pozitiva, en 2009 ni iniciatis la agadon "Virinoj de Hiroshima". Plej gravas, ke niaj membroj mobiliziĝu por prepari pac-mesaĝojn.

Tiuj tri raportoj estas unuanime aprobitaj. Notindas, ke la kompletaj raportoj estas je dispono de la membroj kaj oni sendos al ili post simpla peto.

La renovigo de la 10 malnovaj komitatanoj kaj elekto de nova estas unuanime akceptitaj.

Kotizo : la sumo estas 22 € por 2013. Memorigo : la kotizoj rajtigas impostan rabaton.

La kunsido plu daŭras kun Esperanto-skeĉoj luditaj de la lernantoj de la konversacia kurso. Finfine, nia asocio regalas nin per la tradicia reĝkuko, kiu fermas ĉi jaran kunvenon.

## Notre assemblée générale

L'Assemblée Générale s'est tenue le 16 février 2013 au Centre Jean Vilar à Angers avec une trentaine de participants.

Après les mots de bienvenue, le président fait lecture du rapport d'activités 2012. En voici les points principaux.

- Les cours : niveau 2 (le mercredi) avec 3 élèves et cours de conversation (le jeudi) avec jusqu'à 9 participants.

- Le congrès national des Cheminots espérantophones (AFCE) s'est tenu à Angers du 30 mars au 3 avril. Le groupe d'Angers a contribué à l'organisation et à l'animation.

- Dans le cadre de la Journée de la Paix, notre groupe, qui fait partie du collectif chargé d'organiser les manifestations, a été très présent. Le 19 septembre à Angers, les espérantistes japonais Hori Yasuo et Arai Toshinobu ont présenté une conférence publique sur le thème «Fukushima et maintenant ?», (coorganisée avec "Sortir du Nucléaire-49"). Le 21 septembre, Journée Internationale pour la Paix, le discours de bienvenue était dit en espéranto et en français (présence de plusieurs personnalités locales).

La trésorière donne lecture du bilan financier, celui du service de librairie et propose le budget prévisionnel pour l'année 2013.

Puis le président présente les projets pour 2013 :

► Les invités : le groupe recevra Andrej Grigoriev, journaliste russe, du 21 au 23 mai.

► Journée de la Paix le samedi 21 septembre à Angers. Nous travaillons pour organiser une attraction avec des marionnettes espérantophones.

► Un certain nombre de stands seront tenus à différentes occasions : journée-découverte des associations de la Roseraie par exemple.

► Les cours se poursuivent les mercredis et jeudis et peuvent toujours être pris en cours d'année.

► Notre gazette Anĝeva Folio continue de paraître environ 4 fois par an (disponible principalement sur notre site internet). De nouveau, nous appelons chacun à s'y exprimer, proposer des sujets, des articles...

► Vikipedio : le projet nécessiterait d'être repris pour que notre groupe se fasse mieux connaître. Les volontaires sont attendus...

► Relations avec les autres associations d'Angers : le bilan des années passées est très positif, nous avons lancé en 2009 l'opération "Femmes d'Hiroshima". Il est primordial que nos adhérents se mobilisent pour préparer des messages de paix.

Ces trois rapports sont adoptés à l'unanimité. A noter que les rapports complets sont à la disposition des adhérents et leur seront envoyés sur simple demande.

Le renouvellement des 10 anciens membres du conseil d'administration et la nomination d'un nouveau membre sont adoptés à l'unanimité. Cotisation : le montant est de 22€ pour 2013. Il est rappelé que les cotisations donnent droit à un abattement d'impôt.

La réunion se poursuit avec des sketches joués en espéranto par les participants du cours conversation. Enfin la traditionnelle galette offerte par l'association vient clore cette réunion annuelle.



# ZAMENHOFA TAGO EN REGIONO "TOURAINÉ"

la 9-an de decembro 2012

Al la invito de la Esperanta Kultura Centro de Tours, 5 Anĝevanoj respondis favore kaj renkontiĝis ĉe la Priorejo Saint-Cosme apud Tours. Tie ni ĝuis la grandiozajn, orbrunajn kolorojn, kiujn nia granda rivero Loire prezentis al ni en tiu dimanĉa mateno. Ni estis gaje akceptitaj, kun varmaj trinkaĵoj kaj dolĉaj kukoj.

## Vizito de Priorejo Saint-Cosme

De la 6-a jarcento, oni trovis spuron, en tiu loko, de religia okupado.

Ekde sia fondo en 1092 sur eta terbedo nomata "Insulo Saint-Cosme", monaĥoj daŭre vivis surloke. Tiuj ĉi estis persekutitaj kaj foriris sub la premo de multaj kanonikoj, kiuj volis ĉiam plivastigi sian teritorion. Ĝis la 18-a jarcento, la religia komunumo gastigis, en la priorejo Saint-Cosme, la pilgrimantojn de Saint-Martin-de-Tours survoje al Saint-Jacques-de-Compostelle. La preĝejo atestas pri ilia vizitado : tre ornamita navo, ambulatorio de sanktaj resanigistoj... La kanonika amasmanĝejo entenas katedron de legado de la 11-a kaj 12-a jarcentoj. Oni parolis al la pilgrimantoj per ikonografioj sur la pilieroj : unu marvirino kiu simbolas la tentiĝojn kaj, aliflanke, du barbuoj kiuj simbolas saĝecon.

Ankaŭ ĉeestas, sur kolonoj, marsteloj, ĉar ĝis la 13-a jarcento, la simbolo de Compostelle estis marstelo, kiu poste estis anstataŭigita per Jakoba pekto. Surloke, ankaŭ estis sanitarejo por gastigi malsanajn pilgrimantojn, ĝis iliaj resaniĝoj... aŭ ĝis la morto kaj entombigo en la ĝardeno. Estis grava fonto da mono, donacoj kaj bienoj. La historio de la ĉirkaŭaĵo restas forte influata de la alveno de Pierre de Ronsard, kiu estis Prioro ekde 1565. Kiel pruvo, oni malkovras en la ĝardenoj la domon, kiun li starigis kaj kiu ŝirmas lian dormoĉambron kaj lian studejon.

## Pierre de Ronsard

Li naskiĝis la 10-an de septembro 1524 en la kastelo "La Possonnière" kiu situas en Vendomois-regiono. Li estis duenkasta de nobela familio. Li studis la profesion pri armado sed, pro frua surdeco, li rezignis. Dekvin-jaraĝe, li alvenis al la Franca Kortego. Li akompanis la reĝon en Skotlando kaj vivis dum tri jaroj en Britio. Lia surdeco haltigis

lian promesplenan diplomatan karieron. Deknaŭ-jaraĝe, Pierre de Ronsard iĝis religiulo : li ĵurpromesis pri senedzineco sed ne ĵurpromesis pri obeado, malriĉeco, kaj ĉasteco ! Refoje, li studis la grekan kaj la latinan, kaj dudektri-jaraĝe, komencis verki. Li estis la unua en Francio, en 1550, kiu publikigis odojn (lirikaj poezioj pri naturaj kaj amaj temoj).

Oni rekonas liajn amojn en liaj poemaroj :

La amoj de Kasandra ("Kara, ni vidu ĉu la rozo...")

La amoj de Maria (Ĝi estis la dua amo de



Ronsard).

Sonetoj por Helena ("Kiam vi estos tre maljuna..."). Li estis amiko de Joachim Du Bellay kun kiu li imitis la antikvajn verkistojn.

Li mortis la 28-an de decembro 1585, nur sesdekunu-jaraĝe, kaj estas entombigita en la preĝejkripto, nun ruiniĝinta. Li estis kaj estas unu el la plej gravaj francaj poetoj de la renesanca literaturo.

Post la tagmanĝo en restoracio de Saint-Avertin, refoje ni sorbiĝis en la Renesanco. Membroj de "Esperanta Kultura Centro" de la regiono Touraine prezentis belan lumbildaron pri renesanco-stilaj monumentoj de Tours. Sekvis kelkaj dancopaŝoj de la sama epoko kaj kantoj ĝis la fermo de tiu kunveno.

Vidu plu la renkontiĝon : lumbildaro kun sonfondo kaj 124 fotojn estas videbla ĝis la 31/12/2013. Por eniri la retejon kaj ricevi ligilon kaj pasvortojn, bonvolu sendi retmesaĝon (eĉ malplenan) al mogovoeo@yahoo.com.

## JOURNÉE ZAMENHOF - EN TOURAINÉ

le 9 décembre 2012

À l'invitation du Centre Culturel Espéranto Touraine, 5 Angevains répondent présents et se retrouvent sur le parking du Prieuré St-Cosme près de Tours. Accueillis joyeusement avec boisson chaude et gâteaux, nous échangeons sur les couleurs somptueuses et mordorées offertes par notre Loire en ce dimanche matin.

## Visite du Prieuré St-Cosme

Un peu d'histoire : dès le 6ème siècle on trouve trace, en ce lieu, d'une occupation religieuse. Depuis sa fondation en 1092 sur une petite bande de terre, l'île de St-Cosme, le prieuré a toujours connu la présence de moines. Ceux-ci furent chassés par une peuplade de chanoines, lesquels voulaient toujours plus de territoires. Jusqu'au XVIIIème siècle, la communauté des chanoines accueille au prieuré de Saint-Cosme les pèlerins de St Martin de Tours en route pour St-Jacques de Compostelle. L'église atteste du passage des pèlerins : nef très ornée, présence d'un déambulatorio avec les saints guérisseurs... Le réfectoire des chanoines dispose d'une chaire de lecture des 11è et 12è siècles. Sur les piliers de celle-ci, on s'adressait aux pèlerins par iconographie : une sirène représentait le symbole des tentations et, à l'opposé, deux barbus symbolisaient la sagesse. Sur d'autres colonnes, on retrouve également des étoiles de mer ; en effet, jusqu'au 13è siècle, le symbole de Compostelle était l'étoile de mer et pas encore la Coquille St-Jacques. Il existait également sur place une infirmerie pour l'accueil des pèlerins malades, jusqu'à leur guérison... ou jusqu'à la mort et l'inhumation dans le jardin. C'était là une source d'argent, de dons, et revenus fonciers.

L'histoire du site reste fortement marquée par la venue de Pierre de Ronsard qui en devient le Prieur en 1565. Pour preuve, dans les jardins, on découvre la maison qu'il y fit édifier et qui abrite sa chambre et son cabinet de travail.

## Pierre de Ronsard

Né le 10 septembre 1524 au château de la Possonnière dans le Vendômois, il est le cadet d'une famille seigneuriale. Il étudie le métier des armes mais, en raison d'une surdité précoce, il abandonnera cette carrière. A 15 ans, il arrive auprès de la Cour de France. Il accompagnera le roi en Ecosse et passera 3 années en Grande-Bretagne. Sa surdité lui fera subitement interrompre une carrière diplomatique prometteuse. A 19 ans, Pierre de Ronsard devient religieux : ses vœux sont des vœux de célibat... mais il ne sera pas assujéti aux vœux d'obéissance, de pauvreté et de chasteté ! Il reprend ses études de grec et de latin et commence à écrire. A 26 ans, il sera le premier en France, en 1550, à publier des odes (poésie lyrique ayant pour thèmes la nature et l'amour).

On retrouve ses amours dans ses recueils de poésie (1552-1555) : Les Amours de Cassandre ("Mignonne allons voir si la rose..."). Les Amours de Marie (son 2ème amour), Sonnets pour Hélène ("Quand vous serez bien vieille...").

Il est l'ami de Joachim Du Bellay avec lequel il imite les auteurs antiques. Il meurt le 28 décembre 1585, à seulement 61 ans, et est enseveli dans la crypte de l'église, aujourd'hui en ruines. Il a été et reste l'un des plus importants poètes français de la Renaissance.

Après le déjeuner dans un restaurant de St-Avertin, nous nous replongeons dans le passé. Préparé par le Centre Culturel d'Espéranto de Touraine, un joli diaporama sur les monuments de Tours de style Renaissance est présenté. Suivent quelques pas de danse de cette époque et la journée se termine en chansons.

Le diaporama sonorisé de cette rencontre (124 photos) est visible sur internet jusqu'au 31/12/2013. Pour recevoir le lien, envoyer un courriel (même vide) à mogovoeo@yahoo.com.



# La potkokinaĵo

## gastronomia franca tradicio

La tradicio asertas, ke la reĝo Henriko la kvara, zorgema pri la kontento de la plej modestaj el siaj regatoj plurfoje ripetis :  
 « Se Dio ankoraŭ permesas al mi plu vivi, mi estigos ke ne estu kamparano en mia reĝlando, kiu ne povus manĝi kokinaĵon en sia poto ».



La tradition veut que le roi Henri IV, soucieux du bien-être de ses moindres sujets, ait maintes fois répété :  
 « Si Dieu me donne encore de la vie je ferai qu'il n'y aura point de laboureur en mon Royaume qui n'ait moyen d'avoir une poule dans son pot ».

## humuro

### La potkokinaĵo

(adaptita de Frédéric, el nia konversacia kurso)

Jen anekdoto el la historio de Francio.

Ĝi okazas en la jaro 1610.

La bona reĝo Henriko la kvara decidis iun tagon ke ĉiu franco manĝu ĉiusemajne potkokinaĵon.

Hejme, edzino preparas manĝon kaj la edzo demandas :

- "Kara virino, kion vi preparas ?"
- "Mi kuiras la novan recepton kiu nomiĝas potkokinaĵo ĉar nia reĝo Henriko petas ke oni manĝu ĝin ĉiusemajne."
- "Mi ne tro ŝatas kokinaĵon."

Post unu semajno la edzo demandas maltrankvile :

- "Kion vi preparas ?"
- "Mi kuiras poto-kokinaĵon ĉar la reĝo Henriko petas ke oni manĝu ĝin ĉiusemajne."
- "Ha, mi tute ne ŝatas potkokinaĵon !"

Unu semajnon poste li demandas suspekta :

- "Kion vi preparas ?"
- "Poto-kokinaĵon, ĉar..."
- "Jes, mi scias !!!"

Kaj ĉiun semajnon la edzino preparas la saman manĝon...

Post kelkaj semajnoj la edzo fariĝas tre nervoza.

Li tiam demandas furioze :

- "Ĉu vi denove preparas potkokinaĵon ?"
- "Jes, ĉar..."
- "Sufiĉas !!!"

Lia edzino ne povas fini sian frazon.

Li ekkolereĝas, prenas tranĉilon sur la tablo kaj subite freneze kuras al la strato.

Tiam lia edzino krias :

- "Ravaillac, Ravaillac, revenu !"

### La poule au pot

(adapté par Frédéric, de notre cours conversation)

Voici une anecdote de l'histoire de France :

Cela se passe en 1610. Le bon roi Henri IV décide un jour que chaque Français mange chaque semaine une poule au pot.

A la maison, une femme prépare à manger et son mari demande :

- Ma chère femme, que prépares-tu ?
- Je cuisine la nouvelle recette qui se nomme "poule au pot" car notre roi Henri demande que l'on en mange chaque semaine.
- Je n'aime pas trop la poule au pot.

Une semaine plus tard le mari demande inquiet :

- Que prépares-tu ?
- Je cuisine une poule au pot car le roi Henri demande que l'on en mange chaque semaine.
- Ha, je n'aime pas du tout la poule au pot !

Une semaine plus tard il demande avec suspicion :

- Que prépares-tu ?
- Une poule au pot, car...
- Oui, je sais !!!!

Et chaque semaine, la femme prépare le même plat...

Après quelques semaines le mari devient très nerveux.

Alors il demande furieux :

- As-tu encore préparé une poule au pot ?
- Oui, car...
- ça suffit !!!

Sa femme ne peut pas finir sa phrase. Pris de colère, il prend un couteau sur la table et subitement court frénétiquement dans la rue.

Alors sa femme s'écrie :

- Ravaillac, Ravaillac, reviens !

# Kiel kuiri la potkokaĵon :

Comment préparer la poule au pot :

## la ingrediencoj :

les ingrédients :



kuiristo  
cuisinier



bovida  
kruraĵo  
jarret de veau



ovo  
oeuf



pano  
pain



cepo  
oignon



ajlo  
ail



petroselo  
persil



ŝinko  
jambon



hepato  
foie



karoto  
carotte



napo  
navet



poreo  
poireau



celerio  
celeri



tomato  
tomate

**bonan  
apetiton !**  
bon appétit !

## la recepto :

Boligu en granda poto kun malvarma akvo : bovida kruraĵo, detranĉaĵoj de la kokino. Aldonu salon, pipron, kaj la kokinon 1,7 kg pezan, farŝitan de miksaĵo farita el ovo, 50 g da pano (trempita en lakto), unu cepon kaj ajleron haketitajn, petroselon, 200 g da ŝinko kun hepato de la kokino haketitaj.

Lasu effajre kuiri. Post 1h30 aldonu 8 karotojn, 4 etajn napojn, 2 poreojn, branŝeton da celerio, 1 cepon, ajleron kun ŝelo. Salu, pipru. Lasu plu kuiri malrapide dum 1 horo. Surtabligu la preparaĵon kun koncentraĵo el freŝaj tomatoj kaj kun pan-tranĉaĵoj, sur kiujn oni verŝas la buljonon.

## la recette :

Porter à ébullition, dans une grande marmite d'eau froide, un jarret de veau, les abattis de la poule. Écumer. Saler. Poivrer. Ajouter la poule de 1,7 kg, farcie d'un mélange composé d'un oeuf, de 50 g de pain de campagne (qu'on a trempé dans le lait), 1 oignon et 1 gousse d'ail hachés, de sel, de poivre, d'un peu de persil, de 200 g de jambon et du foie de la poule hachés. Laisser frémir. Au bout d'1h30, ajouter 8 carottes, 4 petits navets, 2 poireaux, 1 petite branche de céleri, 1 oignon piqué de 3 clous de girofle, 1 gousse d'ail non épluchée. Saler. Poivrer. Laisser mijoter encore 1 heure à feu doux. Servir accompagné d'un coulis de tomates fraîches et de tranches de pain sur lesquelles on verse le bouillon.



Je la invito de la Esperanta Grupo de Majno (GEM)

## VESPER-RENKONTIĜO kun Mikhaïl BRONSTEIN la 8-an de januaro 2013 en CHANGÉ (apud Le Mans)

Mikhaïl Bronstein estas ruso. Li estas verkisto, poeto, kaj li kantas Esperante akompanata de sia gitaro.

Esperanto-parolantoj, aŭ ne, kunvenis ĉirkaŭ Mikhaïl, en unu el la salonoj de la "Socia Kultura Centro" en Changé. Komenciĝis la kunveno per lumbildaro, kiu akompanis la Esperantan raporton, verve tradukitan de Jacques Baratié.

Ni vidis belegajn kaj bukolikajn bildojn kaj malmodemajn poŝtkartojn kun neĝoplenaj pejzaĝoj, sed ankaŭ kun infanoj kaj stratscenoj dum jarfinaj festoj. Inter tiuj prapatraj festoj, unu el la plej popularaj en Rusio, estas la somera solstica festo.

Nomiĝas «Ivan Kupala» festo.

Post paŭzo por paroli kun Mikhaïl, konsulti aŭ aĉeti librojn kaj KD-ojn, la membroj de la Esperanto-grupo de Le Mans dividis la reĝkukon kaj regalis nin per trinkaĵoj. Poste, ni reiris al niaj seĝoj por



aŭskulti kelkajn muzikpecojn de impona repertuaro de la kantisto. Jacques Baratié tradukis, en la francan, la klarigojn de la aŭtoro pri la temoj de kantado kaj pri lia persona vivo.



*L'art ancestral russe de faire la fête, à l'occasion du Noël orthodoxe russe*

### La rusaj ritoj de Ivan Kupala

En Rusio tiu festo nomiĝas Ivan Kupala. En la nokto de la 23-a al la 24-a de junio, ĉiuj festis tiun mistikan feston. De la paganisma epoko, Kupalo estis diaĵo en Rusio. Tiu diaĵo personiĝis dum la solstico. Gaja festo estis, kun ritario, legendoj kaj kredoj. Por honorigi Kupalon, oni kantis, oni banis sin nude, oni ekfajrigis kaj saltis super la flamojn.

En tiu tago, la loĝantoj ĉirkaŭligiĝis per flor-skarpoj, kun herbaj kronoj surkape. Ili rondoj formiĝis; la junulinoj jetis florajn kronojn akven: se la krono floris, la junulino edziniĝos.

Tiu rito ŝanĝiĝis al jara festo de somera solstico, miksante paganan kaj kristanan tradiciojn. Nun, la festo pludaŭras, ĉefe ĉe la studentoj.

*La rusa prapatra arto por festigi okaze de rusa ortodoksa Kristnasko*



A l'invitation du Groupe Espéranto du Maine

### SOIRÉE Mikhaïl BRONSTEIN le 8 janvier 2013 à CHANGÉ (près du Mans)

Mikhaïl Bronstein est de nationalité russe.

Il est écrivain, poète, et chante en espéranto en s'accompagnant à la guitare.

Esperantophones ou non étaient réunis auprès de Mikhaïl dans une des salles du Centre Socio-culturel de Changé.

La soirée débuta par un diaporama comme support à l'exposé en espéranto. Celui-ci fut traduit avec brio par Jacques Baratié.

On a pu voir de très jolies images bucoliques et cartes anciennes de paysages enneigés, d'enfants, et de scènes de rues au moment des fêtes.

Parmi les fêtes ancestrales les plus populaires en Russie, on trouve la fête du solstice d'été. C'est la Fête d'Ivan Kupala (voir ci-dessous).

Après une pause pour converser avec l'artiste, consulter ou acquérir ses livres ou CD, les membres du groupe espéranto du Mans partagent avec tous la galette des rois, autour d'un petit verre amical.

Puis, nous réintégrerons notre place pour écouter, en espéranto, quelques extraits de l'imposant répertoire du chanteur. Jacques traduira en français les explications fournies par l'auteur sur les thèmes de ses chansons mais aussi sur son vécu personnel.

### Les rites russes d'Ivan Kupala

Dans la nuit du 23 au 24 juin, tous célébraient cette fête mystique. Dès l'époque du paganisme, une divinité Kupalo existait chez les Russes. Cette divinité se personnifiait au moment du solstice d'été. C'était une fête gaie, avec des rituels, des légendes et des croyances.

En l'honneur de Kupalo, on chantait, on se baignait nu, on allumait des feux et on sautait nu par-dessus le feu. Ce jour-là, les gens se ceignaient d'écharpes de fleurs, avec des couronnes d'herbes sur la tête. On menait une ronde. Les jeunes filles jetaient des couronnes de fleurs à l'eau: si la couronne flottait, la jeune fille se marierait.

Cette action rituelle s'est transformée en célébration annuelle du solstice d'été, en mélangeant les traditions païenne et chrétienne. La fête perdure à nos jours, surtout parmi les étudiants.



### Skota ŝerco

(adaptita de Luciano el nia konversacia kurso)

Boing 787, fama usona  
aviadilo, tre alte flugas super  
Atlantikoceano, inter Eŭropo kaj  
Ameriko.

Interne, en ŝparklaso, vojaĝas  
2 skotoj, 2 skotoj el Skotlando,  
kompreneble.

Subite, la piloto ekkrias per la  
laŭtparoliloj :

« Gesinjoroj,... atentu ...atentu !  
Niaj kvar motoroj ekfajriĝis.  
La situacio estas tre grava.  
Verŝajne, en la maron ni falos.  
Preĝu !»

Unu el la 2 skotoj ekploregas.

La alia skoto demandas lin :  
«Kial vi tiom ploras ? Ĉu vi estas  
la posedanto de la aviadilo ?»

## Le château de Grésillon présente ses programmes de printemps et d'été

### STAGES PRINTEMPS 2013

[www.gresillon.org/printemps](http://www.gresillon.org/printemps)

#### 20-27 avril :

Cours intensifs avec Christophe Chazarein (Toulouse), Stefan MacGill (Hongrie), Ŝtonĉjo (Ile-de-France)

#### 27 avril :

Journée : Examen international d'espéranto CECR (B1, B2, C1)

### PROGRAMME D'ÉTÉ 2013

[www.gresillon.org/ete](http://www.gresillon.org/ete)

Passez une nuit, restez 7 jours ou séjournez jusqu'à 5 semaines !

#### 6-13 juillet :

Semaine touristique avec excursions vers les châteaux de la Loire, toute la journée

#### 13-20 juillet :

Semaine pour les artistes amateurs de théâtre, danses, chants, musique, art graphique et Taiji Quan

#### 20-27 juillet :

Alternative MOJOSejo, semaine sur des sujets alternatifs et pour jeunes avec Ŝtonĉjo et Libnjo

#### 27 juillet - 3 août :

Rencontre de Familles Espérantophones, 35ème REF

#### 3-10 août :

Semaine festive pour enfants, ados, jeunes, familles, et même les bébés et les grands-parents, post-REF

#### 10-17 août :

Semaine de théâtre, cours pour acteurs avec Saša Pilipoviĉ, présentation d'une farce avec George Handzilk



Tél : 02.41.89.10.34

courriel : [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

site : [www.gresillon.org](http://www.gresillon.org)

Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon,  
St. Martin d'Arcé, 49150 BAUGÉ en ANJOU



## Forpaso



Marie-Reine avait commencé l'apprentissage de l'Espéranto à Angers, en 2007.

Elle avait très vite abandonné à cause de ses obligations professionnelles (elle possédait un cabinet de réflexologie plantaire). Elle s'était replongée dans la langue par quelques stages à Grésillon. Nous étions quelques personnes, dont Michèle Jagueneau, à avoir partagé avec Marie-Reine un stage de chant en espéranto à Baugé, dirigé par Franjo Lévêque. Marie-Reine avait ainsi pu participer à une animation en espéranto lors de la fête de la musique à Baugé en 2008.

*Geneviève*

### Hommage d'une amie :

"Je suis très attristée par le décès de Marie Reine.. J'ai eu la chance de connaître Marie-Reine lors de mon passage à Grésillon. Ma relation avec elle a été une vraie relation d'amitié mais trop courte car la maladie commençait à la soucier...

Il me reste de la tisane d'aubépine que nous avons cueilli ensemble lors d'une randonnée ; à chaque utilisation j'avais et j'aurai une pensée pour elle. J'appréciais aussi sa connaissance du chant des oiseaux... je ne veux pas oublier d'elle sa douceur, son beau visage serein, sa disponibilité tranquille et sincère à l'autre. Je pense aussi à ses enfants".

*Franjo*

## Nous contacter

### Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers

Tél. 02 41 73 17 97

Courriel : [info@esperanto-angers.fr](mailto:info@esperanto-angers.fr)

## Vous informer

### [www.esperanto-angers](http://www.esperanto-angers.fr)

[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org)

[www.esperanto-jeunes.org](http://www.esperanto-jeunes.org)

[www.uea.org](http://www.uea.org)

[www.esperanto.net](http://www.esperanto.net)

# Kalendaro

## Selektitaj Esperantaj renkontoj en 2013

### 20 - 27. aprilo

3-a Printempas - en Greziljono, Baugé, Francio. Intensaj kursoj en 3 niveloj kaj internaciaj KER-ekzamenoj B1, B2, C1. Inf.: Esperanto-kastelo Greziljono, Château de Grésillon, FR-49150 Saint Martin d'Arce, **Francio**. Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

### 24 - 28. aprilo

Preparado al la scienc-teknika branĉo de kapableco, staĝo kun Claude Roux en la Kulturcentro Kvinpetalo, Francio. Ĉi tiu staĝo estos okazo studi fakajn tekstojn en Esperanto kaj traduk-ekzerco. Ne necesas mem esti diplomita fakulo por ĝui la staĝon, sufiĉas iom da scivolo pri tiuj temoj. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoir, FR-86410 Bouresse, **Francio**. Rete: [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

### 3 - 5. majo

72-a Hispana Esperanto-Kongreso - en Zaragoza, Hispanio. "Lingvo kaj sento", jen la temo kaj mot(iv) o de nia kongreso, laŭ la difino de Esperanto farita de K. Kalocsay. Inf.: Asocio "Frateco", Cadena, 20, 1° - izquierda. ES-50009-Zaragoza, **Hispanio**.

Rete: [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es)

### 4 - 11. majo

FRINGOJ por infanoj en Greziljono, Francio. Ferio-semajno por infanoj 8-17 jaraĵ, akompanataj de siaj instruistoj aŭ gepatroj. Inf.: Château de Grésillon, 49150 Saint Martin d'Arce, **Francio**. Tel-respondilo : +33-2.41.89.10.34, Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

### 4 - 11. majo

65-a Kongreso de IFEF kaj de UFE en Artigues apud Bordeaux, Francio. Temo: Rolo de la fervojoj en disvolvigo de la moderna mondo. Inf.: AFCE, 9 rue de Château-Landon, 75475 Paris, **Francio**.

Rete: [jeanripoche@wanadoo.fr](mailto:jeanripoche@wanadoo.fr)

### 10 - 12. majo

Brita Kongreso 2013 en Ramsgate, Britio. Gastoparolanto la kuratoro de Edukado.net, Katalin Kováts. Inf.: Esperanto Association of Britain, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE, **Britio**. Rete: [eab@esperanto.org.uk](mailto:eab@esperanto.org.uk) - Tel: +44(0)1782 372141

### 17 - 20. majo

90-a Germana Esperanto-Kongreso - en Nürnberg, Germanio. Kongreso de GEA kaj festo. Inf.: Esperanto-Nürnberg (Sabine Hauge), Moritzbergstr. 37, DE-90482 Nürnberg, **Germanio**, [esperantonord@googlemail.com](mailto:esperantonord@googlemail.com)

### 7 - 10. junio

108-a Skota Kongreso de Esperanto - en Linlithgow, Skotlando (inter Glasgow kaj Edinburgh). Partoprenu la plej altan kongresnombron en Esperantio en agrabla etoso, kun bunta programo. Inf.: David Hannah, Tigh na Cnoc, Ardgay Hill, Ardgay, Sutherland IV24 3DH, **Skotlando**. Tel.: +44 (0) 1863 766061. Rete: [dhannah559@hotmail.com](mailto:dhannah559@hotmail.com)

### 6 - 13. julio

Turisma Semajno kun 23a IEK de Esperantotur en Greziljono, Baugé, **Francio**. Tuttagaj ekskursoj per buso al la reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro kaj historiaj vidindaĵoj de la regiono Anĵuo kun profesia e-ista ĉiĉerono. Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

### 6 - 14. julio

49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-49) - en Utena, **Litovio**. Celoj kaj taskoj : studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri

esperantista laboro, perfektigi en Esperanto. Inf.: Litova Esperanto-Asocio, p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Poŝtelefonoj +370-687-12219 kaj +370-686-69875 . Fakso +370-37-228616. Rete : [litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt) aŭ [pjedorovas@takas.lt](mailto:pjedorovas@takas.lt) aŭ [irenaa@takas.lt](mailto:irenaa@takas.lt)

### 9 - 14. julio

Kultura Esperanto-Festivalo, KEF - festivalo de la originala Esperanto-kulturo en Hillerød norde de Kopenhago, **Danlando**.

Inf.: [kulturaesperantofestivalo10@gmail.com](mailto:kulturaesperantofestivalo10@gmail.com)

### 12 - 20. julio

6-a SES, Somera Esperanto Studado - La 6-a renkontiĝo de lernantoj de 'lernu.net' (sed ne nur de ili) en urbo Martin, **Slovakio**. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, manlaboroj, vespere amuzado. Inf.: [petro@ikso.net](mailto:petro@ikso.net)

### 13 - 20. julio

66-a Kongreso de IKUE en Kalwaria Zebrzydowska, **Pollando** kun la temo "Nova evangelizado". Krom la prelegoj, dum la kongreso oni planas pilgrimon/viziton al Kraków, Auschwitz, Kęty kaj Wadowice. Inf.: Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Rete: [ikuekongreso@gmail.com](mailto:ikuekongreso@gmail.com)

### 13 - 20. julio

Art-Amatora Semajno en Greziljono, Baugé, **Francio**. Teatro, muziko, dancoj, kantoj kaj grafika esprimado posttagmeze, 3 Esperanto-kursoj matene.

Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

### 20 - 27. julio

MOJOSeĵo, alternativa semajno por junuloj en Greziljono, Baugé, **Francio**. Eko-turismo, prelegoj & diskutoj pri ekologiaj & ekonomiaj temoj posttagmeze, 3 Esperanto-kursoj matene.

Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

### 20 - 28. julio

Muzika Staĝo kun Markov-familianoj en la Kulturcentro Kvinpetalo, Francio. La ĝenerala temo koncentriĝos ĉirkaŭ originalaj verkoj en Esperanto. La staĝo finiĝos per koncerto, kie la staĝantoj prezentos la rezultojn de sia laboro antaŭ loka publiko. Ne necesas esti profesia muzikisto por partopreni. Inf.: Kvinpetalo, Esperanto-Centro, 15 rue du Lavoir, 86410 Bouresse, **Francio**.

Rete: [informoj@kvinpetalo.org](mailto:informoj@kvinpetalo.org)

### 28 julio - 4. aŭgusto

86-a Kongreso de SAT - en Madrido, Hispanio. Soci-politikaj debatoj, kulturaj programoj, koncertoj, teatraĵoj, vizitoj al Madrido kaj Toledo. Colegio Mayor San Juan Evangelista. Inf: SAT - Sennacieca Asocio Tutmonda, Asociación Izquierda y Esperanto - SATeH Apartado de correos 8537 ES-28080 Madrid, **Hispanio**. Rete: [esperanto@nodo50.org](mailto:esperanto@nodo50.org)

### 3 - 10. aŭgusto

80-a Itala Esperanto-Kongreso - en Castellaro apud San Remo, **Italio**. Pensu pri io meze inter la kleriga parto de la UK kaj la ekskursoj de la UK, meksika festo, feriaj kluboj ĉe la maro Mediteraneo kaj festivalo de Esperanto-muziko kun rimarkinda junulara partopreno kaj etoso.

### 3 - 10. aŭgusto

Festa Semajno por infanoj kaj familioj, post-REF en Greziljono, Baugé, **Francio**. Farado de maskoj kaj manpupoj. Ludoj, banado, manlaboroj, sporto, muziko kaj E-kursoj.

Rete: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)

Fonto: <http://www.eventoj.hu>